

# Eŭropa Bulteno

Printempo 2008, № 3 (68)

## De la redakcio...

### Karaj legantoj,

*Vi legas la printempan eldonon de Eŭropa Bulteno.*

*Ankaŭ ĉi foje, ni informas vin pri la riĉa kaj interesa laboro de niaj membroj. En tiu ĉi numero vi povas trovi ankaŭ la jaran raporton de EEU por la jaro 2007.*

*Triera TV, unu el privataj TV programoj en Slovenio, kiu en ĉiuj 15 minutoj montras novaĵojn (aldonante freŝajn kaj ripetante gravajn) dum la tuta lundo, la 24-a de marto ripetadis ke Papo okaze de Pasko salutis ankaŭ en Esperanto.*

*La Paskan bondeziron de la Papo Benedikto la XVI vi povas aŭdi ĉe <http://tw.youtube.com/watch?v=jMfACDp3cFI> . Dank' al tiu informo, Esperanto estis menciita almenax 50 foje dum la sama tago.*

*La menciita programo estas amase rigardata, ĉar ĝi donas ankaŭ la plej freŝajn informojn pri trafiko en la lando kaj bonan prognozon de vetero.*

*Mi deziras al vi ĉiuj agrablan legadon kaj belajn printempajn tagojn.*

*Vesna Obradović*



Printempo

## EŬROPA SOCIA FORUMO

Eŭropa socia forumo okazos en Malmø en Svedio de la 17-a ĝis la 21-a de septembro 2008. Se vi eniras la hejmpaĝon de la Eŭropa Socia Forumo: <http://www.esf2008.se> , vi povas konstati ke la ĉefaj informoj troviĝas ankaŭ en Esperanto, ĉar mi tradukis kaj kunlabore kun la prezidanto de la Klubo de Malmø Sten Svenonius kiu laboras en la sama loko kie estas la oficejo de la Socia Forumo, ni sukcesis konvinki la respondeculojn pri la graveco havi ankaŭ esperantan paĝaron! Tio samtempe signifas ke oni povas sendi mesaĝojn en esperanto al la oficejo de la Eŭropa Socia Forumo! Dum la kvar tagoj oni atendas pli ol 20.000 vizitantojn. Esperantistoj havos informbudon. Ni invitas junajn esperantistojn partopreni en diskutlistoj de la Forumo kaj ĉiujn interesitojn viziti la Forumon.

**Heana Schröder**

## ESTRARKUNSIDO EN BRUSELO



La 7-an kaj 8-an de marto okazis en Bruselo (ĉe Sean hejme) kunsido de la estraro de Eŭropa Esperanto-Unio kun partopreno de Sean O Riain, Petro Balaž, Zlatko Tišljar kaj Flory Witdoeckt.

La estraro traktis 10-punktan tagordon. La plej gravaj konkludoj estas la jenaj:

La estraro akceptis la planon kiel finfari la lastajn taskojn rilate la projekton »Alieco kiel valoro« kiu finiĝos la 31-an de marto. La estraro

estas informita pri la laboro de la oficejestrino de nova oficejo en Bruselo kadre de Domo de Internaciaj Organizo (MAI) en strato Washington, Maja Tišljar, kiu ellaboris du eŭropajn projektojn (ni atendas la rezultojn en aprilo kaj junio), agis kadre de la projekto rilata al Eŭropa jaro de interkultura dialogo, organizo de la ekspozicio pri Esperanto en Eŭropa Parlamento, redaktis konferencan libron kaj realigis aliajn taskojn. Tiusence la estraranoj ankaŭ vizitis la oficejon en la urbocentro (vidu la fotojn). Ili estas tre kontentaj kaj opinias ke en tiuj ejoj necesos organizi ankaŭ debatojn kaj aranĝojn direktitajn al eŭropaj parlamentanoj kaj sciencistoj, ĉar eblas lui tre bele ekipitajn salonojn.

La estraro diskutis kiel eluzi la rezultojn de la agado de Ljudmila Novak kaj renkontiĝo kun sinjoro Geremek kaj konstatis ke ni helpos kaj subtenos la starigon de intergrupo en la eŭropa parlamento pri Esperanto. Ni trovis jam dekon da parlamentanoj kiuj certe subtenus Esperanton kaj kiujn oni invitos aliĝi al la intergrupo.

La estraro akceptis kiel membron de EEU Slovenian asocion de societoj por la internacia lingvo, kiu petis aliĝi. Slovenia Esperanto-Ligo neniam aliĝis kaj ankaŭ ties prezidanto Tomaž Longyka deklaris en sia letero en julio 2007, ke ĝi ne intencas aliĝi al EEU.

La estraro ankaŭ traktis la programojn de la Eŭropa konferenco kadre de kongreso de Itala E-Federacio en Grosseto kaj de la EEU-kongreso en Herzberg sekvajare. Ĝi decidias okazigi la konferencon en Italio eĉ se oni ne ricevos monon por ĝi. En Herzberg ni kongresos en 2009 Pentekoste antaŭ la kongreso de GEA. Ni rekomendos al la Herzberganoj elekti du ĉeftemojn simile kiel en Maribor: unu neesperantistan, interesan por la urbo mem (eble ekologian), pro kio oni supozeble povus ricevi iun urban subvencion kaj alian, kiun proponos EEU rilatan al Esperanto kaj eŭropaj temoj (pere de kiu ni povus peti eŭropan subvencion). Oni povos loĝi ankaŭ en privataj hejmoj, kion la estraro trovis simpatia, ĉar tiel eŭropaj esperantistoj povos senpere rilati al la urbanoj de Esperanto-urbo.

La estraro ankaŭ traktis asemblean kunvenon en Roterdamo. Ĝi decidis rezervi lokon por trihora kunsido de la asembleo (fermita) kaj duhora kunveno de la asembleo kun ĉiuj interesitaj kongresanoj. Tie okazos ankaŭ novelektoj de la estraro.

La 9-an de marto en la loĝejo de Sean kunvenis anoj de la brusela klubo kune kun kelkaj estraranoj de EEU kaj traktis la aferojn de agado en la Eŭropa parlamento kaj subteno al la ideoj pri lanĉo de interparlamentara grupo por Esperanto. Partoprenis 6 anoj de la brusela E-klubo.

**Raportis Zlatko Tišljar**

## LETERO AL SINJORO ORBAN

Sinjoro Orban,

Kiel rumano, vi ne povas nescii ke la Komisiono postulis de la landoj liberigitaj de la sovetia superregio, kaj samtempe de la premo de la rusa lingvo, ke iliaj dosieroj de kandidatiĝo al aliĝo al EU estu submetataj al ĝi ekskluzive en la angla, t.e. la lingvo de alia imperio kiu, per sia lingvo, volas trudi sian vidmanieron de la mondo. Per uzo de la nura angla, la Komisiono brile ilustras ke la ĝusta loko de la fasada multlingveco, kiun ĝi rekomendas, kaj de sia maniero konsideri la devizon “Unueco en diverseco”, estas en butikoj de faroj kaj trompiloj (ŝercobjektoj). Estas klare, escepte por naivuloj, ke tiu fiaska multlingveco celas unue krei iluzion de lingva



Leonard Orban

demokratio kaj lasi al la angla la tempon instaliĝi nerenversigeble kiel unika lingvo.

Estus pli saĝe havigi al ĉiu Eurocivitano bonan konon de sia propra lingvo. Tio estas nun nebla pro tio ke la instruado de la angla akaparos ekscesan tempon kiel la unua fremda lingvo kaj deprenas ĝin de tiu dediĉita al aliaj studobjektoj, inter kiuj la gepatra lingvo. Esperanto kiel unua fremda lingvo al ĉiuj gelernantoj de EU, por kio pledis la germana Nobelpremiito Reinhard Selten antaŭ la Eŭropa Parlamento okaze de la Eŭropa Tago 2007, ebligis al la tuta eŭropa junularo regi komunan lingvon post ekiro de la unuagrada lernejo. Tiu kono ebligis senteble plibonigi la lernadon de aliaj lingvoj, ne lasante ekskluzivecon al la angla kiu estas antaŭ ĉio NACIA lingvo.

Se temas pri la artefarita karaktero de Esperanto, kiun vi elvokas, estus pli bone ke vi fidu al via propra inteligenteco ol al onidiroj. Tiam vi alvenus al la konkludo de profesoro Robert Phillipson, la aŭtoro de “Linguistic Imperialism” kaj de “English-Only Europe?” kiu, post observado de la laboroj de la internacia kongreso de Esperanto de Prago (1996) diris: “Cinikeco rilate al Esperanto estis parto de nia edukado”. Mi tamen nepre volas averti vin: necesas intelekta kuraĝo supera al la averaĝa, kaj solida pionira karaktero por rezisti al mokado, kontraŭbatali antaŭjuĝojn, rebati al stultaj atakoj, ktp.

Bonvolu prikonsideri la opinion de du iamaj politikaj homoj, kiuj ludis eminentan rolon en du eŭropaj landoj kaj kiuj havis la kuraĝon montri publike sian esperantistecon :

Prezidento de la respubliko de Aŭstrio de 1965 ĝis 1974, Franz Jonas diris, dum sia parolado prononcita en Vieno en 1970: “Kvankam la internacia vivo fariĝas ĉiam pli intensa, la oficiala mondo daŭrigas la malnovajn kaj maltaŭgajn metodojn de lingva interkompreniĝo. Estas vero, ke la moderna tekniko helpas faciligi la taskon de la profesiaj tradukistoj dum kongresoj, sed ne pli. Iliaj teknikaj aparatoj estas maltaŭgaj ludiloj kompare kun la mondvasta farenda tasko, nome superi la lingvajn barojn inter la popoloj, inter milionoj da homoj.”

Preskaŭ en eĥo, alia homo kies valoro estas ankoraŭ nun agnoskata en Nederlando, la ĉefministro Willem Drees, ankaŭ esprimiĝis pri la temo: “Ni devas finfine havi komunan lingvon por internacia uzo kaj, kiom ajn alloga povas aperi la ideo elekti por tiu internacia lingvo unu el tiuj, kiuj estas jam parolataj de centoj da milionoj da homoj, mi malgraŭ ĉio estas konvinkita ke neŭtrala lingvo, kiel Esperanto — antaŭ kiu ĉiuj homoj estas rajte egalaj — estas preferinda.”

EGALRAJTECO. Kion faras la Komisiono por aplikado de la artikolo 1a de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj sur la lingva tereno por la Eurocivitanoj ? Multlingveco povos esti nur privilegio de elito malprofite al la malplej favorataj socitavoloj de la loĝantaro.

La senbaza karaktero de la argumento laŭ kiu Esperanto estus artefarita estas delonge demonstrita fare de de lingvistoj kun tutmonda renomo kiel Antoine Meillet, la aŭtoro de “Les langues dans l’Europe nouvelle” (Payot, 1918) , Edward Sapir kaj aliaj. Patro de la semantiko, Michel Bréal skribis: “Estas la ekzistantaj idiomoj kiuj, miksiĝante, havigas la konsiston [de Esperanto]. Ne endas montriĝi disdegnemaj; se niaj okuloj (...) povus rapidege vidi de kio estas farita la lingvo de Racine kaj de Pascal, ili ekvidus tutsaman miksaĵon (...) Ne temas, oni bone komprenas tion, senposedigi iun ajn, sed havi komunan helplingvon, t.e. apud kaj aldone al la indiĝena aŭ nacia lingvo, komunan volan kaj unuanime akceptitan peradon fare de ĉiuj civilizitaj nacioj de la Tero.”

Verdire, eĉ se mi preferus vidi vin preni tempon por studi la temon kun la tuta seriozeco kaj rigoreco, kiujn tio postulas, mi ne ligas ekscesan gravecon al la fakto ke, por unu kialo aŭ alia, vi ne faros tion. Se tion vi ne faros, tion faros eŭropaj civitanoj, scivolemigitaj pro tiu kreskanta debato ĉirkaŭ Esperanto. Kaj ili konstatos kion ili kapablis kompreni kaj esprimi post ses monatoj en la unua fremda lingvo kaj kion ili povas kompreni kaj esprimi post samdaŭra lernado de Esperanto. Kaj tion ili diskonigos ĉirkaŭ si.

Koncerne la faktojn ligitajn al la historio de Esperanto en Rumanio, mi povas aldoni al tio, kion mi jam skribis, ke la reĝino Elizabeto de Rumanio (verkistino kaj poetino — aŭtora nomo: Carmen Sylva) instruis ĝin en la Civito de Blinduloj “Vatra Luminoasa”, tiam tutmonde fama, kiun ŝi fondis kaj pro kiu ŝi estis konsiderata en sia lando kiel “la patrino de la blinduloj”. Ŝi patronis la Rumanan Esperantistan Societon kaj lernis Esperanton por meriti la nomon “Esperantista Reĝino”. Ŝia subteno estis jam menciita fare de la unua historiisto de Esperanto, Adam Zakrzewski (pseŭdonomo Z. Adam) en “Historio de Esperanto 1887-1912”, kiun li publikigis okaze de la unua kvaronjarcento de ekzistado de la Internacia Lingvo (p. 138): “Ni ne povas ne nomi tie ĉi Elizabeton, Reĝinon de Rumanujo — eminentan poetinon Carmen Sylva, — kiu estas jam vera Esperantistino”. En piedpaĝa noto: “Ŝi donis al la Rumana Esp. Societo ekskluzivan rajton de tradukado de siaj verkoj.”

Sur dokumento PDF de la Rumana Instituto, elŝutebla ĉe [http://www.institut-roumain.org/programme\\_2007.pdf](http://www.institut-roumain.org/programme_2007.pdf) oni povas legi pri ŝi: “Ŝiaj verkoj, – inter kiuj certaj estas veraj furorlibroj, estis tradukitaj en pli ol deko da lingvoj, inkluzive de Esperanto, kaj rekompensitaj per premioj fare de akademioj el la tuta mondo, inter kiuj la Franca Akademio por siaj “Pensoj de Reĝino” aperinta en 1888 ĉe Calmann Lévy, – kaj altiris al ŝi gravajn amikecojn...” (Gabriel Badea-Paun).

Amikino de la princino Elizabeto, la rumana delegitino ĉe Ligo de Nacioj, Hélène Vacaresco, alportis ankaŭ sian subtenon al Esperanto dum la franca registaro instrukciis sian delegiton por sufokigi la antaŭenpuŝon de Esperanto. Argumenton por kontraŭi Esperanton ĝi trovis i.a. en la “slavmaniera akcentado”! Samnivelaj estas la argumentoj uzataj ĝis nun por kontraŭstari la enkondukon de Esperanto en la instrusistemo de Francio fare de sinsekvaj ministroj de edukado...

**Henri Masson**

## RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2007



En jaro 2007 du novaj landoj eniris EU-n kaj tiel E-organizoj de Bulgario kaj Rumanio fariĝis kandidatasocioj por EEU. Tamen ili ankoraŭ ne aliĝis. Okazis nur interparoloj kun la bulgara reprezentanto dum la EEU-kongreso, kiu opiniis ke BEA baldaŭ aliĝos.

Okazis interparoloj kun la Estona E-asocio, kiu ankaŭ promesis aliĝi. Slovenia Esperanto-Ligo decidis ne aliĝi al EEU, malgraŭ tio ke ĝuste en Slovenio okazis la plej gravaj atingoj.

La kotizon ne pagis regule pluraj landaj asocioj kaj la pagdisciplino mankas ĉe pluraj novaliĝintaj landoj de post 2005.

La financoj tamen pozitive evoluis dank al la unua pli granda subvencio, kiun EEU ricevis de EU por projekto kiun ni realigis kadre de la EEU-kongreso en Maribor.

La ĉefaj elspezoj rilatis al pago de du partatempaj laborantoj: prizorganto de la retpaĝaro Peter Baláž kaj redaktorino de Eŭropa Bulteno Vesna Obradović. Ekde julio elspezoj rilatis ankaŭ al la projekto »Alieco kiel valoro«, kies unua parto estis la konferenco »Interkultura dialogo kaj komunikado« en Maribor. Pro la manko de regulaj enspezoj, ekde oktobro Peter Baláž ne plu estas pagata, sed ni enpostenigis Maja Tišljar kiel efektiviganton de la laboroj por la projekto, por kiu laboro estis antaŭvidita parto de la subvencio. Ŝi ankaŭ transprenis laborojn rilatajn al la slovena prezidado de EU (aperigadon de monata aparta Informilo).

Ĉiuj planitaj eroj de nia laboro estis realigitaj. Ni aperigis 12 numerojn de Eŭropa Bulteno en elektronika formo, kiuj estas legeblaj ĉe [www.europo.eu](http://www.europo.eu) (kaj [www.lingvo.org/bulteno](http://www.lingvo.org/bulteno) kaj [www.gazetejo.org](http://www.gazetejo.org)).

Ni distribuis helpe de Margareta Handzlik al EU-parlamentanoj (732 personoj) en junio leteron kun la invito partopreni en EEU-kongreso en Maribor kaj en ties konferenco »Interkultura dialogo kaj komunikado« en ĉiuj naciaj lingvoj (20).

Preparante la EEU-kongreson en la unua duono de la jaro ni havis plurajn kontaktojn kun gravaj politikistoj en Slovenio: ni plu kontaktis vicprezidanton de la slovena parlamento Marko Pavliha, kiu dufoje intervenis en la Slovena Parlamento. En januaro la slovena registaro traktis lian proponon ke Slovenio en 2008 proponu al Eŭropa Komisiono starigon de nova fonduso kiu financus libervolan edukon de poreŭropa konscio kaj tolero, kies parto estus lernado de Esperanto kaj decidis subteni tiun iniciaton. En majo li pledis por Esperanto okaze de traktado de la leĝo pri defendo de la slovena lingvo. Aŭguste li sendis plian iniciaton al la parlamento petante la registaron trakti la konkludojn de EEU-kongreso en Maribor, kiu ankaŭ estis traktita, sed bedaŭrinde la registaro subtenis nur la punkton jam antaŭe prezentitan.

Ni kontaktis ankaŭ EU-parlamentaninon el Slovenio Ljudmila Novak, kiu partoprenis en la kongreso en Maribor kaj aktive kunlaboris kun EEU preparante specialan ekspozicion pri Esperanto en Eŭropa Parlamento en Bruselo okazonta en 2008.

Baze de la konkludoj de la Bratislava konferenco de Višegradaj landoj okazinta en 2006 ni restis en kontakto kun slovaka vicprezidanto Ĉaplovič, kiu sendis en printempo leteron al eŭropaj ministroj pri kulturo kaj edukado kaj al Eŭropa Komisiono petante organizi registarnivelan konferencon pri lingva politiko en EU. Sen ligo al EEU okazis plia nova iniciato de itala parlamentano Capato trakti Esperanton en la itala parlamento. Speciala grupo de libervolaj

tradukistoj gvidata de Leo De Cooman konstante tradukadis la plej interesajn intervenojn en la blogo de Eŭropa Komisionanino Margot Wallstrom al Esperanto kaj per ĝi al deko da aliaj lingvoj kaj aperigadis tion en la blogo. Tie aperis pluraj poresperantaj intervenoj. Nobelpremiito doktoro Reinhard Selten estis invitita al solenaĵo en la Eŭropa Parlamento okaze de la 50-jariĝo de EU la 9-an de majo en Bruselo kie li publike pledis por Esperanto. Ni sendis invitleteron partopreni en EEU-kongreso al komisionano por lingvoj Leonard Orban. Ni ankaŭ kontaktis Komisionanon de Europa Komisiono Janez Potočnik, post la kongreso kaj li afable petis la



**Margot Wallstrom**

kongresajn dokumentojn kaj post la ricevo li proponis ke ni sendu la kongresan deklaron ankaŭ al komisionano Orban, kion ni ankaŭ faris.

Specialan politikan engaĝiĝon faris franca esperantisto Kristian Garino, kiu kandidatiĝis por la franca prezidanto okaze de printempaj prezidantbalotoj. Pro tio li havis plurajn radio-intervjuojn ankaŭ pri Esperanto.

La estrarano Peter Baláž kompletigadis ttt-pagaron por EEU kaj ĝi nun enhavas ĉiujn necesajn titolojn kaj informojn. La redaktorino Vesna Obradović prizorgis la kongresan ttt-pagaron [www.esperanto-maribor.si](http://www.esperanto-maribor.si), funkciis kiel kongresa sekretariino kaj redaktis la Eŭropan Bultenon. Ni organizis kunsidon de la asembleo de EEU kadre de la kongreso en Maribor dum 2 kunvenoj (ferma kun 20 partoprenintoj kaj publika kun 140 partoprenintoj).

Okaze de Tago de gepatraj lingvoj de UNO EEU invitis landajn asociojn distribui apartan tiuteman afiŝon kiun ellaboris UEA kaj dank' al tio estis tradukitaj tiuj afiŝoj al ĉiuj mankantaj EU-lingvoj. Multaj asocioj dissendis ilin al lernejoj kaj diversaj sialandaj instancoj.

Okaze de eŭropa lingva tago en septembro la estraro invitis landajn asociojn festi ĝin per prelegoj kaj publikaj aranĝoj kiuj laŭeble koncentriĝos al la fenomeno de propedeŭtika valoro de Esperanto. Kelkaj landaj asocioj efektive okazigis tiaspecajn aranĝojn.

Etsuo Miyoshi ankau ĉi-jare uzis monon por reklami E-on en Eŭropo kaj por pagi kostojn de partnereco de EEU en Eŭropa Forumo en Krynica (Pl). Por grandaj meritoj por Esperanto en Eŭropo EEU-estraro atribuis al li specialan diplomon kaj plakedon proklaminte lin honora membro de EEU. Solene la diplomon transdonis Flory Witdoeck, vicprezidantino, al E. Miyoshi dum la UK aŭguste en Jokohamo.

Sed la ĉefa atingo de EEU en 2007 estis tre sukcesa kongreso de EEU okazinta inter la 28-a de julio kaj 4a de aŭgusto en slovena urbo Maribor. Partoprenis 256 personoj el 29 landoj. La kongreso abundis de programeroj kulturaj, amuzaj, ekskursaj kaj laboraj. Du konferencoj paralelis: »Interkultura dialogo kaj komunikado« en kiu prelegis 10 prelegantoj inter kiuj du parlamentaninoj de EU-parlamento: Margareta Handzlik (Pl) kaj Ljudmila Novak (Si). Krome prelegis d-ro Hans Michael Maitzen (At), d-ro Seán Ó Riain (Ie), Zlatko Tišljár (Si), d-ro Vladimir Laričev (Ru), Vinko Ošlak (Si), d-rino Vera Barandovska (De), d-ro Francois Lo Jacomo (Fr) kaj Aleks Kadar (Fr). Ses prelegantoj prelegis pri la ĉeftemo de la kongreso »Akvoj«: Jose Salguero – (Es), dr-o Manfred Westermayer (De), Vesna Obradović (Si), Normand Fleury (Ca), d-ro Endre Dudich (Hu) kaj d-rino Rafaela Oruena (Es).

Okazis 3 teatraj spektakloj: de SEK el Zagrebo (Kroatio), de Saša Pilipović el Kragujevac (Serbio) kaj de Henri de Sabates el Francio kaj 4 koncertoj: de Attila Schimmer, Jomo, Georgo Handzlik kaj Solotronik. Okazis aro da ekskursoj inter ili ankaŭ faka ekskurso al Akvokondukila

entrepreno de Maribor. La kongreso akceptis kongresan leteron kun 5 proponoj al la slovena registaro kaj la konferenco »Interkultura dialogo« akceptis deklaron. La dokumento estas legeblaj en oktobra numero de la Eŭropa Bulteno. Aperis ankaŭ kongresa Libro kun artikolo pri la historio de EEU de Flory Witdoeck. La reago de slovenaj publikaj medioj estis ege kontentiga. Pli ol 20 gazetaj artikoloj, multaj anoncoj en la reto, minimume 3 televidaj raportoj kaj kelkdeko da raportoj en diversubaj slovenaj radioj. En septembro okazis 15-minuta intervjuo kun Z. Tišljár en la tutslovena radio Val 202 kaj en oktobro 5-minuta intervjuo kun li en Slovena Unua Televida Programo, elsendo Dobro jutro, ankaŭ vidita en la tuta lando.

Dua centra sukceso de EEU estis ricevo de la unua subvencio de EU de preskaŭ 25.000 eŭroj por la projekto »Alieco kiel valoro«, kiun ellaboris la sekretario komence de la jaro kaj estis aprobita en junio. Ĝia efektivigado okazadas inter julio 2007 kaj marto 2008) pro kio ni povis enoficigi novan oficiston en funkcio de teknika direktoro Maja Tišljár.

La estraro havis unu fizikan kunsidon (en Maribor julie) kaj 6 SKYPE-kunsidojn.

La estraranoj kaj delegitoj de EEU partoprenis en la aro da internaciaj E-aranĝoj kaj en neesperantistaj lingvaj kaj politikaj konferencoj kiuj iamaniere traktis lingvajn temojn. La prezidanto



Maja Tišljár

Seán Ó Riain partoprenis en la Germana Esperanto-kongreso, en Hamburgo, en majo kaj havis solenan paroladon, la vicprezidantino Flory Witdoeck partoprenis en la sveda landa kongreso 17-20.05.2007 kaj prelegis pri: »De Eŭropo al Eŭropa Unio« kaj »Eŭropa Esperanto-Unio« (de 1965 ĝis nun), la sekretario Zlatko Tišljár partoprenis en hispana Esperanto-kongreso en Palos de la Frontera junio kaj prelegis pri Eŭropa identeco, la estrarano Petro Baláž partoprenis en konsultiĝo de esperantistaj organizoj el mezeŭropaj landoj en Martin (Slovakio) kaj dro Rudolf Fischer en grava konferenco de Eŭropa Unio pri komunika problemoj en Berlino.

En Kopenhago estis organizita lingva festivalo en septembro prezentanta 20 lingvojn, kiun Organizis Ileana Schroeder.

En Strasburgo la turistaj ŝipoj enkondukis apud aliaj lingvoj ankaŭ Esperanton por klarigoj dum vizito de la urbo.

La prezidanto Seán Ó Riain kaj la estrarano Peter Baláž partoprenis en Ekonomia Forumo de Orienta Eŭropo en Krynica (Pollando) septembre, kie EEU havis sian apartan sesion pri la temo »Eŭropo: krizo, ŝanĝoj au ŝanco« kaj sian standon. Tiel la duan fojon EEU estis partnero de la grava aranĝo dank al la organizantino Halina Komar. En la aranĝo en kiu partoprenis pli ol 1500 politikistoj kaj ekonomiistoj el dudeko da landoj, inter ili 2 eksaj ŝtatsprezidantoj (Havel, Kwasniewski), pri Esperanto parolis, Seán Ó Riain, Barbara Despiney, nobelpremiito d-o Reinhard Selten, Etsuo Miyoshi, Witold Stepniewski kaj Aida Ĉizikaite.

Flory Witdoeck kaj Maja Tišljár partoprenis novembre en kunsido de FAIB (Asocio kiu unuigas pli ol 200 internaciajn asociojn registritajn en Belgio) kaj reprezentis EEU. Ili preparolis ankaŭ luon de buroo por EEU en 2008.

Administra laboro estis sufiĉe pli ampleka ol ĝis nun. Printempe necesis ellabori kompleksan projekton kaj efektiviĝi necesajn kontaktojn por povi efektiviĝi la kondiĉojn kaj aŭtune la aferon denove realigis nova teknika direktorino Maja Tišljár ellaborinte projekton por eventuala subvencio pri financado de la oficejo kaj oficisto de EEU.

**Zlatko Tišljár, Peter Baláž**

## UNUA lernu! - RENKONTIĜO DUM „SOMERA ESPERANTO - STUDADO“ OKAZOS AŬGUSTE



Ĉu vi jam scias, kie kaj kiel vi pasigos la someron? Pasintjare sukcese debutinta aranĝo SES (»Slava Esperanto-Studado« - [www.esperanto.sk/ses](http://www.esperanto.sk/ses) ) iom transformiĝis kaj nun organizantoj proponas novan aranĝon - »Somera Esperanto-Studado«, kiu okazos ĉi-jare inter **la 9a kaj 17a de aŭgusto en Modra-Harmónia, Slovakio**, kaj kadre de kiu estos aranĝita ankaŭ **unua grandskala renkontiĝo de lernu!-uzantoj, helpantoj kaj kreantoj!**

La ideo de SES estas fari komunan someran aranĝon, kiu kombinus studadon de Esperanto kun agrabla ferio kaj amuziĝo en internacia etoso kaj kiu estus taŭga kaj por veraj komencantoj, kaj por progresintoj, kiuj volas plibonigi sian lingvokonon. La teamo de *lernu!* jam delonge revas inviti uzantojn kaj helpantojn de la paĝaro al iu komuna aranĝo, sed ĝis nun ne estis bonaj kondiĉoj por tio. Ŝajnas, ke nun venis la tempo realigi tiun malnovan revon! SES jam havas spertan organizan teamon kaj bonegan [ejon](#) perfektan por lingvoinstruado, facile atingeblan de tri eŭropaj ĉefurboj (Bratislava = 30km, Vieno = 80 km, Budapeŝto = 200 km) kaj relative proksiman al la urbo, kie okazos [IJK-2008](#).

Krom studi Esperanton en diversnivelaj kursoj, gvidataj fare de famaj Esperanto-instruistoj (ĝis nun konfirmitaj Stano Marček, Birke Dockhorn, Bertilo Wennergren), eblos partopreni buntan posttagmezan programon, koncertumi kaj danci vespere, la tutan tempon praktike utiligi siajn lingvosciojn komunikante kun aliaj partoprenantoj el diversaj landoj, renkonti prizorgantojn de *lernu!*, lerni pli pri ĝi kaj influi estontan evoluon de la paĝaro, ekskursi, naturumi kaj turismumi (la aranĝo okazos en belega loko apud arbaroj kaj lagoj), sportumi kaj multon pli.

Lernu-teamo invitas ĉiujn lernemajn (kaj *lernu!*-emajn) Esperantistojn partopreni.

Ĉiuj detaloj pri la aranĝo ankaŭ kun aliĝilo legeblas en:

[http://eo.lernu.net/pri\\_lernu/renkontighoj/SES/index.php](http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php)

**Peter Baláž**

---

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita: la 31-an de marto 2008.**

**Redaktorino: Vesna Obradović.**

**En la numero kunlaboris: Ileana Schrøder, Zlatko Tišljar, Henri Masson, Peter Baláž kaj Vesna Obradović**

**Kontakto:** [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.lingvo.org>, [www.euro-po.eu](http://www.euro-po.eu)